

LA PROGRAMO

Vendredo 26 de aprilo 2019

Ekde 14:00 – Akceptado de partoprenantoj en internulejo de Centro de Salesiana Societo (CSS) ĉe la strato Ku Ŝtońcu 124

Kiel pasintjare nia bazloko troviĝos en Salesiana Centro. En tiu komforta loko troviĝas internulejo kie dormos niaj gastoj, la festosalono kie okazos plimulto da programeroj kaj en manĝejo ni komune manĝos kaj kafoklaĉos. La Centro estas facile atingebla per tramo aŭ buso.

17:00 – Komuna tagmanĝo (CSS)

18:15 – Forveturo al Ŝĉecina Filharmonio ĉe la strato Małopolska 48

19:00 – La Koncerto

Tiun vesperon Ŝĉecina Filharmonio prezentos simfonian koncerton dividitan je tri partoj de diversaj komponistoj: - Jean Sibelius – Violona koncerto d-moll op.47, - Witold Lutosławski – “Livre pour orchestre”, - Piotr Czajkowski – Romeo kaj Julia – uverturo – fantazio por orkestro.

22:00 – Kafoklaĉo kun hejmpreparitaj kukoj kaj manĝaĵoj (anstataŭ vespermanĝo)

Sabato 27 de aprilo 2019

9:00 – Komuna matenmanĝo (CSS)

10:00 – Komuna foto

10:30 – Forveturo al urbo.

Dum la ekskurso ni promenos tra la stratetoj de rekonstruita “malnova” kvartalo sube de Kastelo de Pomeranaj Princoj. Poste ni vizitos Muzeon de Historio de Ŝĉecino, kiu troviĝas en malnova urbodomo, kies fundamentoj devenas de XIII-a jarcento. Sekve ni iros al Arkikatedrala Baziliko de Sankta Apostolo Jakubo, kie per lifto ni atingos vidpunkton situantan en ĝia turo je alteco de 53 metroj. De tie ni rigardos panoramon de la urbo kaj aŭskultos pli plej interesaj ŝanĝoj kiuj okazis dum lastaj jaroj.

14:30 – Komuna tagmanĝo (CSS)

16:00 – Muzikkoncerto de violonista kvarteto kaj akordeona dueto de Ŝtata Muziklernejo. Pasintjare ĉarmaj junulinoj dum mallonga koncerteto tiel plaĉis al aŭskultantoj, ke ni decidis denove inviti ilin, ĉi tiu kaze kun iom pli longa prezentado de verkoj de Johanno Strauss. Krome prezentiĝos dueto de junaj akordeonaj virtuozaĵoj.

17:00 – Spektaklo de grupo “Szczecinianie”, kiu prezentos popolajn dancojn kaj kantojn.

18:00 – Prelego de Edeltraud Henning pri ŝia urbo Prenzlau.

18:45 – Elpaŝo de la gastoj (se okazos volontuloj)

19:30 – Komuna vespermanĝo

20:30 – Koncerto de Halinka Rózanek kaj ŝiaj amikoj.

Nia talenta klubanino Halinka kun helpo de amikoj prezentos al ni pli senartifike sian programon kaj certe invitos nin al komuna kantado.

21:30 – Kafoklaĉo kun hejmpreparitaj kukoj kaj manĝaĵoj (ĝis frumateno)

Dimanĉo 28 de aprilo 2019

8:30 ~ 9:00 – Sankta Meso en Esperanto – por dezirantoj (Malgranda Kapelo de CSS aŭ loka preĝejo)

10:00 - Komuna matenmanĝo (CSS)

11:00 - Adiaŭo de partoprenantoj (CSS)